

INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA
PRI ĈIO, KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON.

Sendu ĉion, kio rilatas al la Redakcio kaj Administracio al W. NUTTERS, Ostadestraat 94, Amsterdam, Nederlando.

ABONPREZO: jare 1 Sm.; duonjare $\frac{1}{2}$ Sm. Helpabono: jare almenaŭ 2 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista.

Vizito al la Salminejoj.

Mi staris sur la perono de la fervoja stacio kune kun milkelke da Esperantistoj. Jes, kiam ili parolis la karan lingvon, sur la vizaĝojn flugis ridetoj de feliĉo: tamen, kiam ili restis solaj aŭ silentaj, iliaj trajtoj tordiĝis de malĝojoj kaj zorgoj. la mistera, malica povo ombris iliajn korojn.

„Jen venas la vagonaro”, diris mia kunulo. Apenaŭ ĝi haltis kiam ĉiuj samideanoj kuris kaj puŝis unu la alian por trovi sidlokojn.

„Kial ili faras tion?” mi mire demandis al mia kunulo.

„Ili timas ke la lastaj ne trovos lokojn; cetere, ili tiel kutimis al la konkuro komerca ke eĉ tiam, kiam ili liber-tempas, ili konkuradas unu kontraŭ la alia por siaj plezuroj.”

„Tute vere”, mi diris, dum ia besta instinkto pelis nin al la baraktanta homamaso tra kiu ni perforte penis iri. Sed la fako kiun ni atingis jam estis plena kaj ni serĉis alian parton de la vagonaro. Jen vidiĝis fako en kiu sin trovis nur kelkaj homoj.

„Jen loko”, mi kriis.

„Ne, ne”, diris kun mordante ironia voĉo mia kunulo. „Ĉu vi ne vidas ke tiu fakò estas *duaklasa*?” kaj ambaŭ ni serĉis denove alian parton de la vagonaro.

Fine, ŝvitante kaj maltrankvile, ni trovis lokon kaj sidiĝis.

„Jen vidu kiel ni ĉiuj kuras, puŝas kaj varmiĝas dum verdire, estas multe da loko kaj multe da tempo”.

„Jes”, respondis malĝoje mia kunulo. „Tio estas nia konkura kutimo, kiun konservas la kapitalismo: vera diablajo de la konservativuloj!”

La fako estis malkomforta, malbeia kaj malgranda. Apud

ni sidis palvizaĝa knabino, komizo, kaj kompreneble, tre malriĉa, superante siajn kunulinojn per tio ke ŝi rigardis al la estonteco. Senĉese ŝin turmentadis la demando, kio fine okazos al ŝi, kiel ŝi vivos post kelkaj jaroj kiam ŝi jam maljuniĝas.

Venis al ŝi nur unu solvo: ŝi nepre devos edziniĝi kun ia riĉulo. Pro ĉio ĉi ŝi nun amindumis diboĉulon malsanan, kiu sidis proksime de ŝi.

Post kiam ni eliris el la vagonaro, mia kunulo diris duon-laŭte: „Vi vidis la kompatindan knabinojn kiu faris amajn okuletojn al la diboĉulo, ĉu ne?”

Mi kapjesis silente kaj li daŭrigis per akra voĉo:

„La timo de malsato kaŭzas tion, kaj la komerca konkuro estas kaŭzo de tia timo. Tre certe en la estonteco ekzistos socio kiu tute ne toleros tion”.

Elirinte el la stacidomo ni renkontis muzikantojn. Bele ili ludis „l'Espero”, kaj la zorgoj kaj malĝojoj de la homoj forflugis por kelka tempo dum ni ĉiuj marŝis al la minejoj.

Post iom da tempo ni atingis la enirejon kiu estis malgranda ĉambro. Ĉar ni estis en la nombro de pli ol mil kaj tial ke preskaŭ ĉiuj penis eniri kiel eble plej baldaŭ, fariĝis multe da malagrablajoj. Ŝovita mi estis tien kaj reen, tamen post kelka tempo sukcesis eniri.

Serĉante surtuton por surmeti dum la vagado en la minejoj mi trovis kaj ĵus volis preni ĝin, kiam samideano, kaptante la veston, forŝovis min.

„Ne grave”, mi pensis. „La kompatindulo estas viktimo de la kapitalisma kutimo.”

Por eniri la salminejojn oni uzis liftojn, do, mi aliĝis al la vizitontoj kiuj amase atendis apude. Sed, ho ve! pli kaj pli oni puŝis: virino laŭte kriis „Mi petas, ne tiel krude!”

Dum dudek minutoj mi elportis la aerpremadon, kaj la perfortan ĉeeston de la baraktanta homamaso: sed tio sufiĉis, mi ne volis plu. Elirante en la liberan malvarmetan aeron, mi trovis benkon, sidiĝis kaj profundiĝis en malĝojajn, pezajn pensojn.

„Kial ili perforte konkuras: estas multe da tempo. Cetere, ĉu devos eniri laste.”

Kion farus tie la „superhomoj”? Ĉu ili ne konkuras por la lasta vico? Ne, tute ne. Superhomoj ne tiamaniere konkuras. Konkuro perforta aŭ komerca por ili estus la plej malalta krimo en la mondo.

Tre povus esti ke ili”

Subite mi vekigis.

„Dum kiom da tempo mi dormis?” mi demandis al mia kunulo.

„Du, tri minutojn.”

„Strange, ŝajnas kvazaŭ mi dormis du, tri horojn.”

„Afero konata!” diris li. „En kelkaj sekundoj oni povas trasonĝi jarojn”

„Teruran sonĝon mi ĵus havis. Mi sonĝis ke mi vivas antaŭ longa tempo en kapitalisma socio.”

„Kompatindulo!” li simpatiis.

„Jes, vere estis tremige. Ĉion ni faris konkure: ni ĉiuj penis esti la unuaj kaj verŝajne pensis ke oni mortigos la lastajn.

Estis en mia sonĝo stranga veturilo, malpura kaj malkomforta, kiun oni nomis „vagonaro”. Ni preterŝovis unu la alian por eniri, tamen, kiam ni vidis la vorton „duaklasa”, ni forkuris kvazaŭ la diablo ĉasis nin.

Kion signifis la vorto „duaklasa?”

Mia kunulo longe pripensis mian demandon kaj fine diris:

„Estas malfacile klarigi tion al vi, cetere mi dubas ĉu vi komprenus. Ni lasu ĝin.” Pro tio ke ni intencis viziti la salminejojn kune kun milo da vojaĝantoj ni eniris lukson ĉambron de unu el la aeroplanoj kiu atendis nin. Dum ni aŭskultis interparoladon serenajn kaj varian kaj trinkis citronajn, aŭdiĝis susuro de silkaj vestaĵoj kaj alproksimiĝis laŭ ritmaj paŝoj bela knabino. Ŝi sidiĝis kontraŭen al ni kaj mi tuj rimarkis ke ŝi laŭ la trajtoj tute similas la palvizaĝan malfeliĉulinon de mia sonĝo Tamen, kia kontrasto!!

Jen bela rozvanga feliĉa knabino kies tuta persono radiis de ĝojo, kaj apud ŝi sidis ensorĉita junulo, ĝojante ke ŝi kaj li estas tiel belaj kaj parto de la bela, rava mondo. Venis al mi en la pensojn la diboĉulo de mia sonĝo kaj mi demandis al mia kunulo:

„Ĉu ekzistis en la dudeka centjaro diboĉuloj?”

„Jes, multaj, sed kiam oni forigis la kapitalismon kaj faris la edzecajn leĝojn pli liberaj, tiam, iom post iom naskiĝis nova generacio sana, al kiu tute mankis la diboĉuloj.”

„Jes, sed kiel oni forigis la kapitalismon?” mi daŭrigis.

„Tio rezultis el la ruĝuloj, la malkontentuloj kiuj *ĉiam, ĉie* kaj *ĉiel* proklamis sian malkontenton pri la tiama socio.”

„Ĉu ili estis feliĉaj?”

„Jes, per tio ke ili helpis al la progresado de la mondo: cetere, suferis ili kaj multon oferis. En la minejoj ni vidos

skulptaĵojn kiuj reprezentas iliajn travivaĵojn. Vidu! Jen estas la enirejo."

Mi rigardis malsupren el la fenestro kaj vidis belan konstruaĵon kun kupolo el ora mozaiko. La veturigisto haltigis la maŝinon kaj nia veturilo, gracie kiel birdo flirtis senbrue al la pordoj de la portiko. Super la pordoj mi rimarkis la tekston skulptitan el marmoro:

„Bone kaj vero renkontiĝos.

Virto kaj paco sin kisas”.

Malrapide, trankvile ni eliris, ĉar ni ja havis la tutan posttagmezon por vidi la salmirindaĵojn.

Pro tio ke dekkelke da kamaradoj atendis apud la enirejo, ni promenis en la ĝardenojn por ke ili havu tempon por enliftiĝi.

Kia kontrasto kun mia sonĝo!!!

Ni revenis post kelka tempo kaj malsupreniris ĝis la salminejoj.

Mia kunulo klarigis al mi, ke la ornamadoj estas utilaj por instrui al la infanoj la historion pri la famuloj de antikvaj epokoj.

Ĉar mi ofte aŭdis pri ĉi tiuj mirindaĵoj kaj tial ke mi estis ignoranto pri la historio, mi estis tre scivola por vidi kaj lerni. Unue, ni alvenis al tre bela skulptaĵo.

Ĝi estis simbola, arteca verko reprezentanta la patron de siatempa socialismo „Karl Marx”.

Li staris ĉe alta nivelo kun libro en la mano. Pli malsupre, apartigitaj unu de la aliaj per amasoj da rampaĵoj, kuŝis dormante, kelkaj ellacigitaj laboristoj. Ĉe la piedo de Karl Marx vidiĝis tabuleto sur kiu estis skulptita la teksto „Laboristoj, vekigu kaj unuigu.”

Pro tio ke la esprimoj de malĝojo sur la vizaĝoj de la laboristoj dormantaj, multe similis tiujn de la homoj en mia sonĝo, la skulptaĵo havis por mi strangan allogaĵon. Longe mi rigardis la artecan, teruran verkon.

Apude estis multe da skulptaĵoj pri la ĉefaj scenoj el la vivo de tiu fama ruĝulo. Jen mi vidis lin verkantan en Kologno; jen li renkontis Engels, jen li verkis en Londono, k.t.p.

Por plibeligi la efekton oni lokis malantaŭ kelkaj grupoj belan pentraĵon kiel fonon. Poste mi vidis pluajn skulptaĵojn reprezentantajn multajn tiamajn famulojn kun iliaj travivaĵoj.

Jen franca heroo, jen svisa, jen angla, jen itala, k.t.p. k.t.p.

Nun ne estas la tempo priskribi ĉion ĉi, tamen, antaŭ ol fini mi volas diri kelkajn vortojn pri la mirindaj, skulptataj efektoj, kiujn oni vidigis pri la arto de tiu fama ruĝulo Richard Wagner.

Ni eniris kvazaŭ grandan cirkon, kiu nomiĝis „Der Ring der Nibelungen” halo. Ĉirkaŭe estis serioj de bildoj, kiuj reprezentis scenojn el „Das Rheingold”, „Die Walküre”, „Siegfried” kaj „Die Götterdämmerung”.

Jen, en la unua skulpta bildo mi vidis nimfojn de la Rejno en ĉarma pozo; akvariuma lumo falis de supre filtrita kaj plena de senfinaj nuancoj de perlamoto. Sur la fundo ondis kreskajoj delikataj kiel araneaj retoj. Subite la lumo ŝanĝiĝis, kvazaŭ la suno ĵus brilis, prisma radio de roza lumo miloble speguliĝis sur la oro. Kaj dume, alie sonis muzikaj tonoj formante ravajn aerajn arabeskojn.

„Diinde!” mi diris.

La malgrandegulon ni vidis en apuda skulptaĵo, la tuta fabela efekto denove mirigis nin.

De bildo al bildo ni iris, kaj ĉiam mia kunulo afable klarigis kio okazas ĉe la diversaj scenoj: jen ĉe la montoj, jen ĉe la minejo, jen ĉe la ligna ĉambro kaj la arbaro, k.t.p.

Finfine ni forlasis la salminejojn kaj mi diris al mi en la pensoj: „Spite la arto de Wagner, ĉu estas bone instrui al niaj infanoj pri la estinteco? Ĉu ne la malbelaj estas tro multenombraj? Kial ne forgesi la estintecon? Estis tiom da dornoj kaj apenaŭ rozo.”

Sept, 1912.

TAGULO.

Parolo de Normando.

Viro kaj virino trinkis absinton kaj parolis al la kelnero kun aŭtoritato, kiel faras la personoj, kiuj havas oron en siaj poŝoj. La viro havis terurajn okulojn verdajn, fortajn ŝultrojn, pugnojn sufiĉe blankajn, sed kiuj ŝajnis malmolaj kiel ŝtonoj. La virino havis tro da plumoj sur sia ĉapelo, tro da ringoj ĉe siaj fingroj, tro da falsa nigro ĉe siaj sulkitaj okuloj. Evidente ilia metio estis aĉeti kaj vendi belajn fraŭlinojn.

Kaj, penante por diveni laŭ iliaj gestoj, kion ili faris kaj faros, mi pensis: multaj aĵoj ŝanĝis en la mondo; ne plu estas en nia lando sklavoj nek tiranoj, nek publikaj poŝtveturiloj nek poŝtestroj; eĉ la malsanoj ŝanĝis; ni ne plu havas lepron, kaj ni havas sifilison; iam la sifiliso mem estos venkita. Ni malkonstruis la „Bastille”¹⁾ kaj forigis la

1) Elparolu: *bastij*; fama malliberejo politika franca, tute disfaligita de la popolo, je la komenco de la Granda Revolucio (14 Julio 1789).

korpan turmenton: Francujo mokas Papon; la virinoj volas la voĉdon-raĵton. Ĉio ŝanĝas, moroj, leĝoj kaj dioj. Sed la vendistoj de virinoj ne ŝanĝis.

Hodiaŭ same kiel dum la epoko de Plaute ¹⁾, ili aĉetas kaj vendas virinojn, junajn kaj maljunajn, el ĉiuj landoj, kaj por ĉiuj gustoj; ili kondukas ilin el urbo al alia, ilin ornamas kaj prezentas en magazenoj, en kiujn ĉiu povas eniri. Kaj ĉar tio estas kontraŭ la leĝoj, oni faris specialan leĝon pri ili.

Por ili neniu striko, neniu senlabora tempo. La politika stato povas ŝanĝi kaj la moroj ankaŭ, ili havas ĉiam virinojn tiom, kiom ili bezonas, kaj aĉetantojn riĉajn, potencajn, estimatajn.

Tamen, se vi demandas la virojn, ĉiuj al vi diros, ke ili malestimas la laŭtarifajn karesojn, ke nur libera sento povas doni valoron al tiuj aferoj, ke la diboĉo, tutsame kiel la malpuraj fotografajoj logas nur la kolegojn; sed certe estas, ke la plimulto, kiam ili tiel parolas, mensogas.

Oni diras ofte, ke la virinoj naivaj, se ili okaze aŭdus interparoladon de viroj, en la fumejo, ŝanĝus sian opinion pri multaj aferoj. Ili povas tiel bone sin instrui, ne aŭskultante tra la pordoj. Ili pripensu nur tion: Estas vendistoj de virinoj, kaj ilia komerco estas la plej prospera el ĉiuj komercoj. Tio pruvas ne nur, ke ekzistas malseveraj vidantoj, sed ankaŭ aĉetantoj ja multegaj.

ALAIN.

1) Fama poeto kaj komediisto latina.

Publika letero al K-do VERAMA.

Kara kamarado, se mi kuraĝetas fari opozicion kontraŭ via raporto el Bohemio (pli ĝuste: el tuta Aŭstrio), tiam mi ne faras ĝin kun intenco ĉagreni vin, sed por konvinkigi la k-ojn, kiuj legis vian raporton, de tio, ke erarado estas homeca kaj, ke viaj raportoj ne ĉiam devas esti trafaj.

Antaŭ ĉio mi sentiĝas devigata esprimi miam miron pri tio, ke vi trovas nenian alian temon ol kritiko kaj plendo pri la faroj de niaj partiaj gvidantoj. Certe, ankaŭ tiuj estas homoj kaj sekve eraremaj, kaj mi volonte konsentas, ke ili faradas multe da eraroj. Do, ĉu ne estus pli konvena, pli deca, pli alcela: kritiki la faradojn de nia kontraŭuloj? aŭ, raporti pri disvastigo de esperantismo inter la socialdemokratanoj aŭ pri disvastigo de socialismo inter esperantistaro?

Certe pli konvene ol tedi niajn proprajn anojn. Al mi ŝajnas via artikolo malama kaj ĝi certe ne pravigas vian pseŭdonimon „verama”. Se vi ne almetus „soc. dem.” mi, kiel ankaŭ soc.-dem., ne sentiĝus devigata al tiu eldirado.

Sed, al afero. En via raporto mi oftfoje trovas la vorteton „oni”. En kies nomo vi parolas? Kies gvidanto vi estas? Kiu rajtigis vin ĝeneraligi? Oni! Kiu estas tiu „oni”? Ĉu tuta socialdemokratano en Aŭstrio? aŭ Bohemio? aŭ almenaŭ parto? Ĉu ne nur vi mem? Ĉu via opinio estas la ĝenerala?

Ĝeneraligo estas mensogema faro.

Vi citas vortojn de deputito Liebermann. Tio, kion li diris, estis liaj propraj pensoj. Li ne parolis en la nomo de sia partio, el kiu multaj ne konsentis. Tio, kion diris Renner, estis bone dirita. Estas la devo de ĉiu vera soc.-dem. helpi detrui la rusan carismon, la plej teruran malamikon de ni, de libereco, de kulturo. Carismo detruiita signifas: pli facilan bataladon kontraŭ la subpremeantoj de ĉiuj ceteraj landoj eŭropaj. K-do, ĉu vi kun tio nepre ne konsentas?

Kial vi metas „representantoj de la popolo laboranta” inter krampetoj? ĉu por malhonorigi la deputitojn? ĉu tiu atributo ne estas rajtigata?

Laŭ via 5a alineo: la reprezentantoj de la popolo laboranta ŝajne tute konsentis kun la faro de la aŭstria registaro. Tamen, en ĉiu laborgazeta numero, aperinta dum tiamaĵ tagoj, vi povis legi la postulon, ĉu malkaŝe aŭ kaŝe, postulata de la soc.-dem. partio: Balkano apartenu al la Balkanlandoj!

Vi skribas: „escepte el milito profitemaj kaj tutgermanaj fanatikuloj”. Vidu do. Ĉu ekzistas nur germanaj fanatikuloj? Neniaj rusaj, serbaj, francaj, anglaj, bohemiaj, k.t.p., ĉu ne vi mem per la supre cititaj vortoj pruvas vian fanatikan malamecon kontraŭ germanoj? Kial do vi diras: „kiel ekzemple balkanlandanoj, poloj aŭ loĝantoj de Alpoj landoj?” Ĉu ĉiu loĝanto en la cititaj landoj estas militentuziasmaj? Ĉu vi ne legis la protestojn de la balkanaj kamaradoj?

Vi skribas: „ĉi tie eĉ malgranda infano scias, ke vundoj kaj malsato doloras”. Kia naŭziga frazo! Fi! Ĉu vi kiel bonedukata homo ne hontas pro eldiro de tia aĉa frazo? Nur ĉe vi scias tion eĉ malgranda infano? Eble nenie alie infanoj sentas malsaton, eble... ho, ne kredeble malsaga!

Vi diras: „la soc.-dem. deputito Seitz volis koncernatan manifeston legi en...” Tio pruvas, ke vi ne konas aŭstrian parlamentan ordon. Vi ne scias kian minacon faris grafo Stürghk. Jen citaĵo el la parolado de Seitz, 26 Nov. 1912,

en aŭstria parlamento, prenita el „Arbeiter-Zeitung” de 27 Nov. 1912:

„La fakto, kiu devigas min direkti al la prezidanto demandon, estas tiu, ke la manifesto, decidita antaŭ nelonge de la ŝiulanda laboristaro organizita, kiu, per decaj vortoj, esprimas plej rimarkindan kaj gravan politikan opinion, kiu trovis estimon en la tuta mondo, ankaŭ ĉe la kontraŭuloj kiel demonstracio de milionoj da homoj estas ŝatata, kaj kiu hodiaŭ en la tuta mondo estas disvastigata, en Aŭstrio estis konfiskata per la prokuroro. En tiu manifesto... (parolis pri enhavo kaj pri aliaj konfiskitajoj)... Tiuj interpelacioj estis transdonataj ĝustatempe, antaŭ la 12a, al la prezidanto. La prezidanto estas devigata laŭorde ilin legigi (ne per la interpelacio, sed per la sekretarioj). Tamen, ili ne estis legataj ĉe l' fino de la kunsido. Post demando mi ricevis de la prezidanto la respondon, ke li tenis ankoraŭ en la mano la interpelaciojn, kiam la vicprezidanto, lin anstataŭinta, legis la interpelaciojn. Kun tiu klarigo mi ne povas esti kontenta. . . . Suspekto estas farebla, ke la prezidanto havas aliajn intencojn. La prezidanto estas kaŭze suspektata, ke li pri tio, kiamaniere li gvidos la parlamentan ordon kaj ĉu li agu laŭleĝe kaj laŭ parlamenta ordo, antaŭe demandis la ministran prezidanton, ke li per ordinara minaco: forpreni la dietojn, vidis sin igata subpremi la interpelaciojn”.

Ĉu malfermo de parlamento celis la minaco? Ĉu do vere la soc.-dem. deputitoj timis la perdon de dietoj?

Plue, la balotado ne okazis pro lego de koncernata interpelacio, kio okazis dum sekreta kunsido (la kunsido, dum kiu Seitz paroladis, estis publika), sed pro publikigo de la protokolo de la sekreta kunsido. Tiamaniere estis malebligata la publikigo de la manifesto.

Vi eldiras: „... Dum la balotado ĉu permesi aŭ malpermesi la legadon de la manifesto”. Tio ne estas eraro, ankaŭ ne malsaĝaĵo, sed efektiva mensogo! Ĉu vi ne legis la parlamentan raporton? Se jes, kiamaniere vi legas?

K-do, vi ne estas prava, vi ne meritas la titolon „verama soc.-dem”. Vere bedaŭrinda estis la malĉeesto de tiel multaj deputitoj. Sed estas fakto, ke en Bazel partoprenis pli ol 40 aŭstriaj deputitoj; aliaj mankis pro diversaj kaŭzoj. Tia friponaĵo de la parlamenta prezidanto estis nepre ne atendita. Same okazis dum la ekzistado de la aŭstria parlamento nur unufoje antaŭe, en la jaro 1901 pro moraj aferoj. Ĉu la deputitoj devis tion antaŭsenti? Diru vi, verama soc.-dem..

ĉu vi antaŭsenti tion? Kaj, tamen, vi kuraĝas diri: la propono nur pro kulpo de proponantoj falis, ke la soc.-dem. deputitoj timis la perdon de dietoj. Ĉu tio estas parto de via verameco? ĉu tio estas la vero? ĉu ne kalumnio? ĉu vi ne kalumnias la tutan aŭstrian deputitaron de la soc.-dem. partio? Pro kio? Tralegu la paroladon de Seitz iomete pli atenteme!

Vi skribas: „se jes, kial do Seitz ne atendis kun sia propono ĝis ili estos revenintaj?” Denove sensencaĵo! Se Seitz estus atendinta ĝis la aliaj estus revenintaj, lia propono ne plu estus estinta farebla: laŭ la ordo de la parlamento. Al li ja ne estas eble rompi la ordon. Tion povas nur la prezidanto.

Fine vi diras: ni ĝis hodiaŭ ne scias pri kio oni agis en la packongreso. Malvero! Ĉu vi elektive nenian gazeton legis? Eĉ en burĝaj estis legeblaj raportoj enhavantaj pri kio oni traktis en la packongreso.

Do, diru al mi. Kiu vi estas? Kie vi loĝas? Mi rajtigas red. de I. S. R. doni al vi mian adreson. Mi estas preta sendi al vi la koncernatajn gazetojn. Kio estis nekonata en Aŭstrio, tio estis nur la teksto mem de la manifesto. Ĉio alia estis preparolata oftfoje kaj diversmaniere en multaj journaloj.

K-do, vi estas esperantisto, vi povas esti socialisto, sed vi ne estas soc.-dem. Skribu en burĝajn gazetojn pri la soc.-dem. partio kaj ĝiaj gvidantoj, por ke niaj malamikoj moku nin pro tia ano, sed ne, por ke niaj ceteraj k-doĵ kredu malveraĵojn.

K-do, kiu ajn vi estas, ke vi estas esperantisto, tio faras min senti amike. Mi volas supozi, ke vi nur eraris. Estu nenia malamikeco inter ni. Sed mi petas vin korege, pri-pensu estonte pli bone.

Via EDMONDOZ.

SOCIA MOVADO.

El Anglujo.

La nova jaro komenciĝis en Londono per striko de la aŭtomobilistoj; ĉi tiuj aĉetas mem la bezonatan petrolon, kaj pro la altiĝo de l' prezo, mankas al la veturistoj sufiĉa salajro. La burĝa klaso, kies journaloj, per poetaj vortoj laŭdas „La delira ĝojo de la senĉevala veturilo” k.t.p., neniun vorton diras pri la homoj batalantaj por viviloj — tute ne, tio estos pago por la estonta legado de iliaj infanoj, ni esperu en pli feliĉaj tagoj.

En la nordo de Anglujo strikas la forta metiunuigo de kolorigistoj. Ili postulas 0.30 Sm. pohore. La distriktoj de Leeds, Bradford, Halifax, baldaŭ spertos la efekton de la striko. Ĉar la teksindustrioj ne povos labori sen kolorigata lano, k.t.p.

9000 ĉesis laboron, kaj se oni ne aranĝos la aferon antaŭ la semajnfino, dekofoje tiu nombro simpatie strikos. La grava signifo de ĉi tiu striko vidiĝas, se oni memoras, ke la dependantaj industrioj estas inter la plej malbone pagataj en nia lando, kaj ni povas atendi pluajn sekvojn. Tiuj, kiuj esperis ke la laboristaro kvietigis dum 1913, jam ektimas ke „La laboristaro postulos sian propron.”

Petro Kropotkin, la ĉie konata anarkiisto, estas suferinta pro duobla pneŭmonio; feliĉe, la lastaj raportoj diras, ke li progresas tiel bone kiel espereble.

La striko de la kuracistoj kontraŭ la servo-kondiĉoj de la nacia asekuro, tute malsukcesis, je la lasta 14000 doktoroj troviĝas je la nomaro.

La leĝo efektiviĝas hodiaŭ la 15an al tiuj, kiuj devige pagis 26 semajnajn kotizajojn.

HOYLE.

El Franclando.

Ofte la alilandaj kamaradoj parolas erare pri la sindikatismo en Franclando. Ili trovas ĉi sube tradukajon de artikolo montranta tion, kio estas „l'action directe” (senpera agado). Ĝi estas verkita de Léon Jouhaix, unu el la sekretarioj de la ĝenerala konfederatio de l' laboro. Ĝi estas en tri partoj, kiuj aperos po unu ĉiumonate.

Pri „senpera agado”, oni komprenas la movadon de l' laborista klaso, gvidatan de la laboristoj grupiĝintaj en siaj klasaj organizajoj. Ĉe la sindikato, kaj per ĝi, la proletario inklina al sociaj plibonigoj, agas, batalas kontraŭ la potencoj, kies premoj pezas sur li. Tiuj potencoj: labormastraro, Ŝtato, nomitaj kapitalismo, devas malaperi por esti anstataŭataj de pli bona administrado de la aferoj, funkciaj je ĉies profito. Por atingi la fincelojn, kiujn ĝi difinas al si, la proletario devas mem agi, atendante de neniu ian ajn helpon, tia atendo povanta nur plimalfortigi ĝian postulan movon.

„Senpera ago” esprimas la direkton de batalo, inter la manoj de la nuraj profitantoj: la salajruloj.

Estas kontraŭ ĉiuj fortoj labormastrara kaj reganta, ke tiuj salajruloj devas direkti sian batalon, do, ili ne prunteprenu al tiuj fortoj la malplej grandan helpopecon ilia sola celo devas esti, ilin plimalfortigi, ilin forigi.

Tiu laborista ago prenas laŭ la cirkonstancoj kaj la anaroj, diversajn formojn, ĉiujn devenantajn de la sama ideo, kaj ĉiujn direktatajn al la sama kontraŭbatalanto. Tiuj formoj estas jen laŭ batalaspekto, sin montrantaj per la laborĉeso: estas striko; jen sin esprimantaj per neproduktanta laborado: estas sabotado aŭ ankoraŭ per inteliganta konsumado de l' aĵoj: estas bojkotado; aŭ fine per la simpla premo de organizajo kies potenco estis jam elprovata de l' labormastraro, kaj faranta ke tiu ĉi akceptas aranĝojn aŭ kuncedajojn.

Sed, estu pri striko, sabotado, bojkotado aŭ premo, ĉiam la organizajo estas direktanto de l' batalo, pro la volo de la ĝin konsistigantaj membroj.

Ĉe la disvolviĝado de tiuj diversformaj agoj, okazantaj multnombraj, variaj povas ekstari: ili estas neniam unuformaj nek ĉiam similaj. Tie ili manifestiĝos ĉe trankvilo preskaŭ absoluta: tie ĉi ili tradukiĝos per subitaj, jen neatenditaj kaj pacaj: aliloke ili vestiĝos per perforteca karaktero nasita de kontraŭstaro aŭ de minacoj.

Sed, tiuj okazantaj estu trankvilaj, variemaj, aŭ perfortecaj, ili estas nur la eksteraj manifestadoj de preparita ago, gvidata de l' organizajo, kies vivo disvolviĝas kaj kies funkciado daŭras post tiuj diversaj okazantaj. Unuvorte, la striko, sabotado, bojkotado, premo estas la formoj mem de l' senpera ago, la perforteco estas nur ĉiam ĝia akcidento.

Trad. A. PANLOU.

Respondo al Esfio. — Kiel tradukinto de la artikolo de Girard, mi havas respondecan parton. Mi zorgas la veron tiel bona mem verkante kiel tradukante. Do jen mia respondo.

La socialistaj deputitoj estas ĉe parlamentejo por zorgi pri la popolo, ili do devas fari la laboron por kiu ili estas pagataj.

La projekto Berry estis proponata la unuan fojon, je la 30a de Novembro 1911a; ĉiu deputito ricevis la presitan projekton.

La projekto Millerand la 3an de Februaro 1912a.

Ili ambaŭ estis alsenditaj al la armea komisiio, kies unu el la 6 sekretarioj estas socialista. Krome 4 socialistoj estas membroj.

La raporto de tiu komisiono estis farata je la 14 de Marto 1912a.

La 25an de Marto ĉe la parlamentejo, antaŭ multenombra ĉeestantaro, post diskutado pri kelkaj aferoj, la prezidanto sciigis pri la diskutado de l' projekto Berry—Millerand, li legis laŭte la unuan artikolon, la *esencan*.

Berry, l' aŭtoro, petis por paroli. La prezidanto respondis: Sed S-ro Berry, la diskutado pri tiu leĝprojekto estis enskribata je tagordo, kondiĉe ke ne estas pri ĝi debato.

S-ro Berry respondas: Laŭ tiaj kondiĉoj mi ne insistas, ĉar mi ne volas prokrasti la aprobon de tiu leĝo, al kiu mi atribuas la plej gravan valoron.

La projekto estis tuj poste, *sen proteste* akceptata.

La 29an de Marto la senato aprobas saviĉe. La 30an de Marto la respublik-prezidanto diskonigas.

Se unu socialisto estus petinta por paroli post S-ro Berry, la diskutado estus ne okazinta.

La 30an de Nov 1911a S-ro Aubriot, socialisto, respondis al Berry, kiam la projekto estis prezentita. Li do sciis ĝin. Li ne estas sola, sed mi mallongigas.

Oni diras, ili ne ĉeestis la 25an de Marto. Trompo. Je la malfermo de l' kunveno S-ro Wilm parolas (li estas socialisto). Li forlasas la tribunon. En la daŭro de kelkaj minutoj, aliaj leĝoj estas aprobitaj — kaj projekto Berry—Millerand estis proponata. La prezidanto demandis ĉu iu deziras paroli?

Nur Berry leviĝis, oni legis supre ke li sidiĝis tuj poste.

Ne unu socialisto faris la geston sendontan la projekton por pli malfrua tempo.

Ĉu ili ne plu ĉeestis? Jes, ili estis tie, ĉar pri la voĉdon-reformo, ili multe paroladis.

Jen rapide skizita la afero, ĉu Girard faris „malindan mensogon” aŭ „gravegan eraron”?

Girard verkis: „Hodiaŭ la principo de tiu malnobla leĝo „estas akceptita. Pro respekto de farmaniero parlamenta „estas nur sur konsidero de pli aŭ malpli, ke ĝi estis atakita. Por ke opinio estu punebla de . . .” legu sekve.

Kion korektis Compère-Morel? relegu gekamaradoj lian korekton.

Kiu mensogis malinde, aŭ eraris gravege?

La socialistoj faris sian tutan devon? Eble! mi ne estas tia socialisto, kaj atendas nenion bonan de tiu flanko, nek pli, cetere de alia parlamenta. Mi do ne scias tion, kio estas la devo!

Sed mi suspektas ke ili estas blindaj, surdaj, mutaj.

La devo por mi estas alio.

Sentimeco ne devus sufiĉi inter kamaradoj. Mi ne toleras ian insulton. Nomi min venena raportisto aŭ tradukanto de malindajoj, estas la plej grava insulto al mi. Mi protestas energie.

A. PANLOU.

N.B. La gekamaradoj legantaj francan lingvon povas sin dokumenti plene legante „Contre la loi Millerand” de Belaisi, broŝuro, 4 spesdekojn, ĉe Les Temps Nouveaux, 4 Rue Broca, Paris.

El Galicio (Daŭrigo).

Inter tiaj malfavoraj cirkonstancoj komencis la evolucio de l' ukraina socia movado. Ĝia komenco estas kunligita kun la nomo Miĥaelo Draĥomanov, la plej granda ukraina sciencisto, kaj la fondinto de la socialismo en Ukrainujo. Estimante liajn grandegajn meritojn por la ukraina socia movado, mi opinias tre ĝusta, doni tie ĉi la karakterizon de Draĥomanov kiel socialiston kaj politikan aganton.

Miĥaelo Draĥomanov naskiĝis la 1841 jaron en urbo Hadjaĉ en Ukrainujo (Rusujo). Vizitante Kievan universitaton li intencis aldoni sin al historiaj studoj kaj aspiri universitatan katedron. Sed li ne fermis sin en la sciencula kabineto, sed vigle partoprenis en la socia movado de la tiama ukraina socio, kaj instruis en dimanĉaj popolaj lernejoj.

La komencon de l' 70-aj jaroj li estadis en okcidenta Eŭropo, kie li ekkoniĝis kun tiea socialismo. Fine li ricevis katedron ĉe la Kieva universitato, sed baldaŭ la cara registaro komencis opinii lin danĝera, kaj li, kompreninte, ke en Rusujo estas necie disvolvi ian ajn agadon, li forveturis Genevon, kaj tie, kiel socialisto, disvolvis tre vastan, literaturan agadon. Tie li eldonis multe da Ukr. broŝuroj kaj en 1878a jaro fondis la ĵurnalon „Hromada” (Komunumo), en kiu li klarigis siajn sociajn kaj naciajn konvinkojn. Sub influo de liaj verkoj kaj de liaj personaj rilatoj kun la plej eminentaj reprezentantoj de la Ukr. universitata junularo estis fondataj jam en 70-aj jaroj la unuaj socialistaj grupoj. En Vieno komencis agadi precipe Ostap Terleckyj, kiu eldonis tri socialistajn broŝurojn: „La Maŝino”, „Pri la Vero”, „Pri la Malriĉeco”. En Lvovo komencis, sub influo de Draĥomanov, tre viglan agadon Miĥaelo Pavlyk kaj Ivan

Franko, kaj ĉirkaŭ ili ekgrupiĝis tuta progresema junularo. Ĉiuj ili, tiuj unuaj pioniroj de la Ukr. socialismo enfalis tuj sur la sojlo de l' vivo en malliberejojn, kion kaŭzis precipe iliaj propraj samlandanoj, denunciante ilin antaŭ la registaro. Post la liberigado el malliberejo komencis Pavlyk la eldonadon de la socialistaj monataj jurnalaj: „Hromadzkyj Druh” (Popola amiko”), „Molot” (La Martelo), „Dzvin” (La Sonorilo), kaj samtempe Osyp Danyluk eldonis gazeton por presistoj „Praca” (La Laboro) en pola lingvo kun kunlaborado de Pavlyk kaj Franko. Ĉiujn tiujn eldonaĵojn subtenis Drahomanov per siaj multaj kaj eminentaj artikoloj.

En 1880 j. aperis la unua programo de la galiciaj socialistoj, presita en Genevo: tamen, tiu ĉi programo neniam eniris en vivon. La kaŭzo de tio ĉi estis naciaj kontraŭaĵoj kaj precipe la malhelpoj de la flanko de t. n. polaj „socialpatriotoj.” Sekve tio, la socia movado en Lvovo mizeriĝis kaj ne pli frue ol 1890 jaron prenis novaj organizajn formojn.

Nome en 1890 j. komenciĝas en Galicio la radikala partio, fondita de konuloj kaj disĉiploj de Drahomanov kaj li mem, je okcidento de siaj tagoj, jetas sin tre intensive en laboron por la eldonaĵoj de la nova partio, „Narod” (Popolo) kaj „Hliborob” (Terkulturisto) — kaj krom tio eldonas aparte eminentajn broŝurojn en kiuj li majstrece popularigis sciencon kaj socialismon. Tiuj ĉi liaj broŝuroj estas ĝis nun preskaŭ la unikaj originaloj en la Ukr. socia kaj ĝenerala literaturo, kiuj serioze traktas sociajn problemojn. Inter tiu ĉi laboro renkontis lin subita morto la 20an de Junio 1895, en Sofio (Bulgarujo), kie li en la lastaj jaroj de sia vivo okupis historian katedron ĉe tiea universitato.

El Germanujo.

Je la 15a de januaro la tarifo en la lignaj-industrio en 53 lokoj finiĝis kun pli ol 50.000 lignajlaboristoj. La lastajn jarojn la organizado de la lignajistoj (Deutscher Holzarbeiter Verband) tre progresis kaj venkis preskaŭ ĉiujn batalojn. Nun la asocio nombras preskaŭ 190.000 membroj kaj pro tiu kaŭzo ĝi estis sufiĉe granda diktadi al la majstroj siajn kondiĉojn. Tion nun multe ĉagrenis kaj ĉagrenas la fimastroj kaj ili interkonsentis nun tiun malamatan organizadon energie almiliti kaj disigi aŭ estingigi. Pro tio ili do maldungos multe da laboristoj. Sed ili kalkulas sen la laboristoj, la batalo estos akra kaj nuntempe oni ankaŭ ne povas antaŭdiri kio okazos, sed ni rigardas certa kaj kuraĝa en la

estontecon. La solidareco de l' laboristoj ankaŭ en tiu batalo venkos kaj ni venos nun paŝon pli proksime al nia celo.

LIGNAJISTO.

El Hungarujo.

Fine la Hungara registaro prezentis legprojekton pri la reformo de elektraĵo, kiu baldaŭ estos traktata en la parlamento. Estas neeble ĝin konigi detale pro la manko de spaco en nia gazeto. Laŭ la projekto, rajton havos la instruitaj homoj (abiturientoj) ĉe la 24a, aliaj ĉe la 30a jaro, se oni sukcese finis ses elementajn lernejojn kaj pagas iom da imposto. Kiuj ne finis ses elementajn lernejojn, sed tamen scias legi kaj skribi, rajton havos, se ili (metiistoj) de du jaroj, terkulturistoj de kvin jaroj laboras ĉe la sama majstro. Kiu ne scias legi kaj skribi, havos rajton, se tiu pagos 40 kronojn da imposto. Tiu ĉi projekto tute ne kontentigas la soc. dem. partion, tial ĝi volas proklami amasan strikon je la traktado de la projekto, por eltrudi pli bonan leĝon de la parlamento.

La situacio pri la milito ĉi tie neniel ŝanĝiĝis.

Budapest, 15-1-1913.

SINCERA

El Nederlando.

Ŝajnas, ke 1913 por nia lando fariĝos jaro de treĝa batalo.

En urbeto Goor 600 *teksistoj* estas elŝlositaj jam dum pli ol monato. Riĉega industria reĝo per tiu rimedo klopodas sufoki komencantan organizadon inter „siaj” laboristoj, al kiu li per malvarmo kaj malsato volas klarigi, ke ili devas esti iloj senvolaj de la mastro.

En Amsterdam de 5a de januaro strikas la *tipografiistoj* por iom pli da salajro kaj iom malpli longa taglaboro. Kelkaj el la plej grandaj entreprenoj tuj cedis. Strikas 800 laboristoj, membroj de la Nederlanda Tip. Ligo, Katolika Ligo, Kristana Tip. Ligo, k.t.p. La mastroj estas ankaŭ forte organizitaj. Ili unue klopodis provoki ĝeneralan „elŝloson” en Amsterdam. Poste, ili volis disvastigi la batalon tra la tuta lando, per dispartigo de laboro „infektita”. Momente, 23 Jan., ŝajnas, ke en tio ili sukcesos.

Pli ampleksa ankoraŭ ŝajnas fariĝonta la batalo en la *tabakindustrio*. Striko jam komenciĝis en Rotterdam, Dordrecht, Gorinchem. La respondo de la forte organizita mastraro estis: proklamo de tutlanda elŝoso je 10 de febr. La striko jam estis komenonta en pasinta aŭtuno. Tiam la fabrikestroj

faris promeson, sed poste sub ĉiuj pretekstoj penis prokrasti la plenumon.

En Hago strikas kelkaj plombistoj: ankau tie la mastroj minacas per elŝoso.

El Rusujo.

Rusujo festadas. (El esta socialista gazeto „Uus IIm” [Nova Mondo] eldonata en New-York). — Malsatego, premegado, reakcio . . .

Sed Rusujo festadas. Longaj festentagoj okazas. Nunjare solenado okaze centjaro de „forpelado de Napoleono”, komencon, de venonta jaro de „tricentjaro de regado de cara familio Romanov.”

Vere, tre mallarĝa estas tiu festadanta „Rusujo”, nur tiu parto de ĝi, kiu kutimiĝis aŭ devigata estas, ĉe ĉiu paŝo, tenadi la manon ĉe orelo kaj bleki kiel papago: „sluŝajus, vaŝe blagorodie (mi aŭdas, Via Moŝto).

Sed tiu ĉi oficiala Rusujo ja estas, kiu estas videbla de flanko, pri kiu parolas la gazetoj, kiu estas facile konstatebla. Ĉio alia estas perdiĝinta en iu nebulo krepuska.

Oni scias, ke tie troviĝas tute alia mondo, kaj se de tempo al tempo de tie aŭdiĝas la sciigoj pri malsatego, kondukanta milionojn al tombo, aŭ pri epidemioj, etendantaj siajn nigrajn flugilojn trans larĝaj valoj de la lando, kiam el Sevastopolo, Taŝkento aŭ de aliaj lokoj pafado de soldataj ribeladoj disportadas la eĥon de kreskanta revolucio, tiam oni por unu momento sin haltas por pripensi . . .

Sed ekkrakas la tamburoj, eksonadas la pokaloj, kaj premegado de centmiliono popolo, ĝia mizero kaj malfeliĉego perdiĝas sub ĝojkrioj de oficiala, altranga, solenanta „Rusujo.”

Rusujo festadas. Rusujo!?

Pendigiindulaĉoj, malnoblulaĉoj, timemulaĉoj, montrintaj noblecon de sia morallo kaj animo, sian honestecon, siajn herecon kaj bravecon en persekutado, premegado, ŝtelado kaj mortigado de popolo, forkurado de Manĝuraj kampoj, akvumado per sango popola Kaŭkazon kaj Apudbaltan landon, en perfortigado de Finlando — tiu aro de uroj sovaĝaj, kiel sin mem nomas la rusa nobelaro, laŭdigas nun siajn proulojn, sin mem, kiel savintojn de patrujo, kaj iliaj „publicistoj” nenion scias pli rakonti, kiel laŭdi kiel „patrolandon savintajn” tiujn urojn sovaĝajn, iliajn malproksimvidecon, ruzecon . . .

Kiel heroojn devas nun blindigita popolo honori tiujn, kiuj ĉe Napoleono-invado tute same senprudente dancadis

en Moskvo, Peterburgo, kaj aliloke, kiel iliaj posteuloj je niaj tagoj dum antaŭvespero de Japana invado Port-Arturon kaj dum Zusima katastrofo. Grandlaŭdi tiujn sentaŭgulojn, kiuj pretaj estis genuerampi antaŭ Napoleono, se li nur ne estus forprenonta de ili iliajn sklavojn, ne liberigos iliajn servutulojn! Tiujn ĉi patrujo-defendintojn, kiuj, kiel carino Mario Feodorovna, pretaj estis forkuri trans regno-limoj, por povi nur ĝuadi la „trankvilecon”. Glorigi tiujn timemulaĉojn, kiuj, post unua venko de Napoleono (sub Smolensko) kiel kokinoj senkapaj lasis siajn bienojn. Tiujn oferemajn patrujo-defendintojn, kiujn caro per minacoj devigis liveradi al militistaro plej bezonajn vivnecesajojn, kiuj ne malpli ŝteladis la regnan havaĵon ol iliaj posteuloj, nunaj poŝtelistoj, pro kio, ekzemple, en tendaro sub Tartino la rusaj soldatoj dufoje pli ol francaj, mortmalvarmiĝis.

Sed kiu parolas nuntempe ankoraŭ pri tiaj veraĵoj! Por kio do ekzistas ĉe ni „historiistoj”. Ĉe iliaj hundaj laŭdegoj perdiĝas de horizonto la timemeco, malnobleco, krimema diboĉado: nuliĝas tiu de ili pendigulaĉoj mem konfesita veraĵo, ke post Smolenska batalado nur soldatoj ne perdiĝis: forgesiĝos tiu nedisputebla fakto, ke, elversante siajn sangon por siaj estroj, rusa vilaĝanaro plilongigis sian sklavecon por 50 jaroj . . .

Ĉi ĉio perdiĝas . . . Restas nur: orkudritaj figuroj de generaloj, monumentoj sur placoj, sonorado, fumado sensenca, tondro de kanonoj, sensenca hurrakriego, ja dancado sur dorso de popolo, kies buŝo premfermiĝas la sanga pugno, kaj muĝa kriegado de dungitaj aplaudantoj.

Booje, booje, carja hrani! (Dio, caron gardu!).

Tradukis AKTIVULO.

El Nova Zelando.

Tiu ĉi „lando sen strikoj” estas nuntempe plena je strikoj. Tamen ni havas „repacigan kaj arbitracian leĝon”, per kiu oni intencis ebligi, ke leono kaj ŝafido kunĝu kunĝu en paco, ke rabanto kaj rabato interfratiĝus.

Ĉiu metia unio povas (ne estas devigo) enregistri sin. Kiam poste okazas malkonsento inter vendanto kaj aĉetanto de laborforto, tiam la afero povas esti donata en manoj de „repaciga juĝaro”, formita el 3 laboristoj kaj 3 kapitalistoj, sub prezido de „paciga komisario”. Se tie la partioj sukcesas interkonsenti, tiam la afero per subskribo de juĝisto fariĝas leĝe liganta por 2, 3 jaroj (ĝis kiam la juĝaro denove kun-

sidas). Se oni ne sukcesas interkonsenti, tiam la afero devas esti transdonata al „arbitracia juĝejo”, kie prezidas juĝisto kun unu reprezentanto de laboro kaj unu de kapitalo, kiuj aŭdas delegitojn de laboro kaj kapitalo, informigas pri kostoj de nutrado, loĝado k.t.p., kaj poste leĝe fiksas la laborkondiĉojn por sekvantaj 2, 3 jaroj. Okaze de striko intertempa, la strikantoj estas punataj per punmono aŭ malliberejo.

Sajnas tre bona leĝo, ĉu ne? Nu, jen sceno el arbitracia juĝejo, okazinta antaŭ monato en malgranda urbo:

Kapitalista reprezentanto al senlabora laboristo: Ĉu vi deziras laboron?

— Jes.

— Ĉu vi estas preta iri al Waihi? (por rompi strikon).

— Ne.

Al alia laboristo: Ĉu vi vizitas bioskopon?

— Mia salajro ne tion permesas.

— Tio ne estas respondo. Al alia laboristo: Ĉu viaj infanoj iras tien?

— Ĉu vi supozas, ke mi restigas miajn infanojn hejme, kiel kokoj en kesto?

La juĝisto (ricevante 15.000 Sm. da salajro jare): Certe, estas vi kaj via klaso, kiu subtenas tiujn teatrojn.

Kompreneble, la laboristoj ne povas atendi justecon de tiu arb. juĝejo, malgraŭ tio, ke estas en ĝi laboristo-representanto, ĉar ties salajro da 5000 Sm. jare helpas lin forgesi kion mem li suferadis, kiam li havis nur laboristan salajron.

Dum la lastaj 3, 4 jaroj multaj labor-unuiĝoj iom post iom (kiam ili leĝe povis), nuligis sian enregistrigon, por plibonigi siajn laborkondiĉojn per „rekta agado” kun la patronoj, kaj aliĝis al „Federacio de la Laboro” (pleje ministoj). La laboristoj de la „Waihi” orminejo tre plibonigis siajn laborkondiĉojn per tiu agado.

La minejkompanio tion ne ŝatis, kaj instigis kelkajn el la inĝenieroj forlasi la unuiĝon de l’ ministoj, formi alian, kaj aliĝi al arbitracia juĝejo (ĉiu unuiĝo de 15 aŭ pli da personoj, registrata sub la arbitracia juĝejo, povas laŭ speciala klaŭsulo, iom post iom retiri, vole aŭ nevole, milojn en ĝin).

Antaŭ 5 monatoj la Waihi ministoj (1500) rifuzis mallevi la perfidajn inĝenierojn en la minejon. Ili strikis. Ili ankoraŭ strikas. Jam la laboristoj de tiu ĉi lando kaj de Aŭstralio

sendis al ili 200.000 Sm. por subteni ilin. Kompreneble, la kapitalistoj subtenas la perfidajn inĝenierojn. La strikantoj estis tre ordemaj. Ili ne drinkis nek batis la perfidulojn. Ili ne liveris okazon al la kapitalistoj sendi soldatojn aŭ policanojn. Tial la kapitalista klaso enuis, ili sendis aron da policanoj por malsukcesigi la strikon, kvankam ne unu el la perfiduloj estis batita, la policanoj arestis multajn strikantojn pro ke ili marŝis malantaŭ la perfiduloj, nomante ilin perfidulojn, kaj metis la naztukon al la nazo kiam ili preterpasis kaj eĉ pied premis la kalkano de unu el ili.

La magistrato kondamnis ilin pagi mongarantion, ke ili ne „rompos la pacon” dum unu jaro.

La ministoj rifuzis kaj nun 45 restas en la Aŭklanda malliberejo.

10an de Okt. ni faris 24-horan simpatian strikon por la malliberuloj. Tial mi, ĉar mia unuiĝo (brikkonstruistoj) estas arbitracia, estos monpunata aŭ iros al la malliberejo.

Antaŭ du semajnoj, je sabato-vespero, la Aŭklantaj laboristoj organizis marŝadon al la malliberejo (du kilometroj): 5 ĝis 6 miloj da personoj, spite de l’ pluvo, marŝis kaj kantis la „Ruĝ-Standardo” k.t.p. ekster la muroj de la malliberejo. La sekvantan tagon okazis alia subĉiela kunveno, eble la plej granda iam vidita ĉi tie. Kompreneble, la tuta burĝa ĵurnalaro estas kontraŭ la strikantoj, ankaŭ la politika laborpartio. Ni havas unu laborĵurnalon, sed bedaŭrinde, estas nur semajnan.

Ne povas esti paco inter la rabanto kaj la rabato.

Via tre frate,

C. H. PARKER.

Nia Revuo.

Pri la nova formato — kiun jam de longe kelkaj k-doĝ proponis — multaj legantoj esprimis sian opinion. Kun unu escepto — Leipzig — ĉiuj aprobis ĝin. Jen unu el la opinioj:

„Plej belega estas la nova formato de nia ĉiam valorinda l. S. R. Nuntempe, ni devas ĝoji: jam antaŭe mi tralegadis ĝin ĉiu monato du, tri foje, nun mi povas kunporti ĝin al la laborejo, kaj mi tralegas ĝin dufoje ĉiu tage, ĉar efektive, nia kamarado redaktoro estas sciinta la mezuron de mia poŝo. Ĉar kiam venas la submastro, kvazaŭ magie,

automatie, faldigas la revuo kaj unu mano eklaboras, dum alia enpoŝigas ĝin.

Angle ni havas lernejan proverbon „ekzercado perfektigas“: kunsklavoj, bonvole notu.” T. H.

Jen statistiko de nia Revuo je 1a de Dec. 1912: nombro da abonantoj en:

	31 Dec '12	1 Junio '12		31 Dec '12	1 Junio '12
Germanujo	231	128	Usono	10	18
Anglujo	104	63	Aŭstralio	6	6
Franclando	80	75	Hinujo	2	2
Aŭstrio	53	31	Japanujo	2	2
Nederlando	51	44	Rumenujo	2	0
Hispanujo	41	19	Svedujo	2	2
Rusujo	20	16	Brazilujo	1	4
Bulgarujo	14(?)	14	Turkujo	1	0
Hungarujo	14	14	Mandjurio	1	1

634 439

Ses aŭ pli da abonantoj nia Revuo havis je 1 Dec. 1912 en:

Parizo	± 40	Chemnitz	12	Dortmund	8
Leipzig	36	Hannover	12	Essen	8
Amsterdam	23	Barcelona	11	Leeds	8
Vieno	21	Braunschweig	11	Londono	8
Hamburg	20	Burnley	10	Berlino	7
München	18	Düsseldorf	10	Jena	7
Frankfurt	17	Halifax	10	Bradford	6
Stuttgart	17	Letschworth	10	Chester	6
Bilbao	16	Nürnberg	10	Glasgow	6
Praha	15	Sheffield	10	Huddersfield	6
Hago	13	Tarassa	10	Meissen	6
Trieste	13	Altenburg	8	Rotterdam	6
Bolton	12	Budapest	8		

Depost 1a de Dec. 1912 kelkaj urboj pliigis sian nombron kun kelkaj ekzempleroj; forte alteniris Leipzig: de 36 al 50! Kelkaj urboj senteble malgrandigis sian nombrom, dum el la indisaj abonantoj multaj ne ankoraŭ reabonis. Sed I.S.R. trovis agentojn en kelkaj novaj urboj. Entute ni tamen jam restis super 600.

La E.S.F.I.O.

La kunveno de Januaro okazis la dimanĉon 19an.
La protokolo de la antaŭa kunveno estas aprobata.

Sciigoj estos sendataj al la k-doj en Seine Inférieure, Doubs kaj Savoie. Ni ricevis la tradukon de l' broŝuro de Cachin, urbkonsilanto de Parizo, pri Kapitalismo kaj Socialismo.

I. S. R. publikigis leteron de Compère-Morel kiel respondo al la artikolo kiu estis tradukita el la „Temps Nouveaux“.

K-doj raportas pri la paroladoj faritaj en Levallois-Perret, Bel-Air, Pantin, Batignolles, Rosny-sous-Bois, Saint-Georges-Rochechouart, Neuilly-sur-Seine.

La propono demandi raporton pri internacia helplingvo Esperanto ĉe la proksima Kongreso de la Federacio Socialista de la Seine estis ĉie aprobata. La sekcio de Pantin malfermis kurson post la parolado; 4 kamaradoj de Bel-Air aliĝis al Esfio, unu el ili lernis nian lingvon kaj iĝis profesoro de nova kurso.

Paroladoj estos farataj en Bercy, Bagneux kaj Croulebarbe.

K-do parolos en Amiens dum kunveno organizota de la sekcio socialista, sub prezidanteco de Lecointe, deputato.

La kasisto ricevos la kotizajon por 1913; li sendos la kartojn.

La kunveno de Februaro okazos la dimanĉon 16an, je la 9a matene, en la Maison Commune du 3^o, 49, rue de Bretagne.

La sekretario SENRONO.

Esperanta kolonio en Brazilujo.

Ĉar mi konvinkigis, ke la plej granda parto ne jam ion scias pri tiu lando, mi ilin petas, ke ili al si lasu sendi: „Der Kolonist“, tuta jarkolekto 1912: 1.40 M. (1.75 fr.); adreso: „Der Kolonist“, Zürich, Svislando, Schmidgasse 4. Per ĝi oni plej bone informiĝos, tiel ke oni ne plu bezonas ies informon. Pluajn informojn donas la brazila konsulejo en Marseille, Francujo, kaj la Centra Oficejo por elmigrado en Berlin W. 35, Am Karlsbad 10, senpage.

V. STRASSER.

Al Redakcio.

Leginte pri Balkanlandmilito en Jan.no. la sekcio Sottevilla de Liberiga Stelo aprobis la energian respondon de Redakcio. Milito al milito, por ke efektiviĝu laborista internacio.

LA SEKR.

Alvoko.

Por pruvi la fakdiversecon de Esperanto ĉiu grupo devus posedi bibliotekon por instrui la lernantojn. Tro malriĉa kaj malmultenombra, la nia petas la gekamaradojn, organizaĵojn, aŭtorojn, eldonistojn, kiuj povus sendi ion al ni, ilin tion faru.

Tio estus grava servo: ĉar inter la tuta esperantajmaso certe estas legitaj libroj, jurnalaj neniam legotaj denove.

Oni pensu pri malriĉaj grupoj.

Sendi al Sekr. de Lib. Stelo, 268 Rue de Paris, Sotteville les Rouen, Franclando.

BIBLIOGRAFIO.

Esperanta Scienca kaj Literatura Libraro; celo: vekti la homan konscion en ĉiuj direktoj kaj aperoj de la vivo, per kolekto da libroj el ĉiuj regionoj de la scio, kaj facile kompreneblaj sciencaj priskriboj; samtempe propagando por Esperanto per malmultekosta libro, tiu plej bona propagandilo. Ĉiu libro kostas nur tiom, kiom kostas ĝia preso. Aperos:

D-ro J. B. Marchlewski, „Ekonomio Socia — kio ĝi estas kaj kion ĝi instruas.” Prezo 10 Sd.

Felix Perl, „Historio de l' Franca Revolucio”. 10 Sd.

D-rino Daszynska-Golinska, „La moderna Alkoholismo”.

Gerhard Hauptmann, „La Teksistoj”. Dramo en 5 aktoj.

Prof. D-ro Anton Menger, „La politiko de l' Popolo. Ĝeneralaj principoj de ĉiu vere demokratia politiko”. 25 Sd.

Wilh. Bölsche, „La deveno de la homo”. 25 Sd.

Tiu serio okupos \pm 6 monatojn. La eldonitaj libroj ne estas senditaj unuope, sed en kelkaj ekzempleroj, ekzemple al esp. societoj kaj propagandistoj. Nur poste, kiam la tuta serio estas aperinta, la libroj estos po ekz. vendataj al apartaj samideanoj.

Ĉiuj mendoj kaj korespondadoj estu direktataj al Ant. Czubrynski, Strato Retoryka 10, Krakau, Aŭstrio Galicio.

„Laborista klaso kaj Socialismo”, de Marcel Cachin, el franca lingvo esp. L. Berland kaj L. Vergnaud; prezo Sm. 0.10: 49, rue de Bretagne, Paris. Traktas en malgrandaj ĉapitroj jenajn temojn: La progresoj de S.; S. kaj burĝara kontraŭklerikalismo; S. kaj ministroj; S. kaj strikoj; S. kaj kunhelpado; S. kaj respubliko; Situacio de la laboristaro; Vera

kaŭzo de la laborista mizero; La burĝa potenco; Kapitalismo kaŭzas militojn; Kapitalismo la malamiko; Celo de S.; Kontraŭ labormastroj; Ni havu kuraĝon!

„Bibliografio de Esperanto” Vol. 1. Bibl. notetoj pri libroj pub. de 1887 ĝis 1903. Eldono de Esp. Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Parizo; prezo: 2 frankoj.

„Lingvaj respondoj” (nova serio) de D-ro L. L. Zamenhof; Eldono de Esp. Centra Oficejo, 51 rue de Clichy, Parizo; prezo 75 centimoj.

KORESPONDADO.

K-do Carl Mailand, Mönchebergstr. 8 S/II, Cassel, Germanujo; per il. pk. aŭ leteroj pri lingvaj temoj kun eksterlandaj gekamaradoj. — K-do Walter Weckel, en Liebschwitz No. 17, Sachsen, Germanujo; kun k-do en ĉiuj landoj. — K-do Vencislav Kryzám, Fossstrato 4/17, Wien XIV, Aŭstrio; per il. pk. kun k-oj en ĉiuj landoj. — K-do Ĉefek Frant, Hasnerstrato 56/12, Wien XVI, Aŭstrio; dez. interŝanĝi il. pk. kun gekam. — Kamaradino Anna Croese — Kloeck, Torenlaan 168, Laren (N.-H.), Nederlando; kun gek-do pri socialistaj temoj; ĉiam respondos. — K-do Jacob Kloeck, de Wittenkade 70/1, Amsterdam, Nederlando; kun geeksterlandanoj pri ĉiaj temoj; ĉiam respondos. — Ĉiuj legantoj estas petataj sendi statistikojn kaj aliajn gravajn sciigojn rilate al virina movado al K-do H. Kretschmer, Leipzig, Sachsen-Germanujo, Jahnstr. 43. — S-ro W. Robinson, 22 Highthorne Str., Armley, Leeds, Anglujo; dez. kor. kun gek-do en Nederlando kaj Belgujo, por ke ni povu viziti unu alian iam venonte por perfektigi la paroladon. — Lernantoj de baldau finonta kurso dez. kor. kun alilanduloj. Oni respondos ĉiun karton. Skribu al: Esperanto-grupo laborista, Karlstr. 107, Stuttgart-Cannstatt, Germanujo. — S-ro H. Jöris, Wendenstr. 368, Hamburg, Germanujo; per il. pk. nur kun eksterlandanoj; ĉiam tuj respondos. — K-oj Maurice kaj Raymond Bonnet, 67 rue Julien Lacroix Paris (20e); Nicolas Jacquemotte, 88 rue Oberkamph, Paris (11e); kaj Jean Membre, 54 rue du Chemin Vert, Paris, kvar esperantaj lernantoj el „Liberiga Stelo”; dez. kor. per il. pk. — Kiu deziras fotografajon, montrantan unu el bohemiaj lernejoj en Wien, perforte fermita (vidu I S. R. de Dec. 1912), tiu sin turnu al K-do F. Franc, Goldschlagstr. 52, Wien XIV, Aŭstrio.

— K-do W. Henning, Koernerstr. 6/I, Halle a. S., Germanujo, serĉas k-dojn artamantojn; ĉiam respondos senprokraste. — Dez. kor. K-do Otto Pünschel, Kurzestr. 4, Merseburg, Germanujo; K-do W. Winder, Neustr. 12, Bitterfeld, Germanujo; K-do Otto Junghahn, Altestr. 11/II, Leipzig-Pl., Germanujo; K-do Rich. Appelt, Hähnelstr. 22, Leipzig-Li., Germanujo; — K-do Ernest Groll, Lobdergraben 2, Jena, Germanujo; kun ĉiulandaj samideanoj: — K-do G. Gehrman, Hainstr. 6; G. Lohr, Sprembergerstr. 5; M. Wosseng, Lutherstr. 5, ĉiuj en Cottbus, Germanujo, kun gek-oj el tuta mondo per leteroj aŭ il. pk.; — K-do B. J. Gosman, Quellijnstr. 154, Amsterdam, Nederlando, per il. pk.

Al F-ino Jane Short, kondamnita je 3 monatoj de malliberujo (vidu I. S. R. Nov. 1912, p. 122) estas senditaj pk.: 2 el Rusujo, 3 el Francujo, 3 el Germanujo, 1 el Austrio, 1 el Nederlando, 2 el Hispanujo, 1 el Japanujo. La registaro ne permesis al ŝi ricevon de l' kartoj antaŭ fino de l' mallibertempo. Ŝi nun respondos. Ŝi korega dankas la k-dojn kaj la simpatiaj bondeziroj kortuŝis ŝin.

NIAJ KALKULOJ.

En kaso je 28 de Novembro: 119.26. Ni ricevis (sole por I. S. R.): en Parizo, frankojn: Altenberg 3.50, Sechet 1.25, Fafet 2.50, Trouilloud 2.50, Ley Robert 3.50, Gilbert 2.50, Senro 0.50, Esfio 6, Habert 1.25, Dumont 3.50, vendo ponumere 1.20, kune 28.20 fr. = 13.83 guld. En Amsterdam, guld. (ĝis fino de Dec.): Parker 1.80, Cornish 1.80, Süss 2.90, Dreyer 2.55, Wandert 2.06, Haensler 1.96, Boothman 3.02, Cnossen 1.20, Miller 1.50, Hamburger-Cordes 2.50, Sebert 1.20, Spoel 1.20, Stanisic 1.20, Jürgensen 2.37, Roth 5 46, Frimberger 0.86, Hyams 2.40, Sammons 1.20 Crowther 1.81, Toth per l. 2, Goodliffe 1, Jarvis 1.15, Reimann 1.47, Denis 1.19, Talieri 1.20, Filippetti 1.20, ponumera vendo 3, kune 51.20; entute 184.29.

Elspezoj: en Parizo: sendo, kor. kaj diversaj 4.70 fr. = 2.32 guld. Preso de la n-ro, sendo, korespondo k.t.p. 58 g.; kune 60.32 g.

Enspezoj . . 184.29 guld.

Elspezoj . . 60.32 „

En kaso . . 123.87 guld.